

Leterkesto, diversajoj, 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 novembro 15.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-24/SRI-1990-24-A-3-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-diversajhoj.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigas nian konversacion kun la geaŭdantoj, kiuj skribis kaj ni multe dankas al ĉiuj, kies mesaĝoj aŭ raportoj plenigas nian leterujon.

A.- 13 mesaĝojn sendis Bruno NAJBARO en Keighley, Britio. Li skribis:

Ni ĉiam aŭskultas la leterkeston kun granda intereso. Gesinjoroj prave mencias, ke la esperanto-lingvaj disaŭdigoj de SRI estas ofte sonbendigataj kaj miloj aŭdas ilin poste. Ĝuste, la hodiaŭan programon mi mem surbendigis kaj venontsemajne, ne miloj, sed almenaŭ deko de niaj klubanoj aŭdos ĝin.

Cl.- Juan NARVAEZ FERNANDEZ en Badajoz, Hispanio, skribis:

A.- Ekde du monatoj antaŭe, grupeto da esperantistoj en tiu ĉi urbo en okcidenta Hispanio daŭre aŭskultas viajn elsendojn en Esperanto. Por izolita grupo kiel ni estas, tio estas grava, ĉar ebligas al ni aŭskultadon de bone parolata esperanta lingvo. Viaj elsendoj estas la solaj, kiujn ĝis nun ni povis ricevi klare en tiu ĉi regiono. Kutime ni enmetas ilin en sonbendon kaj poste reaŭdas ilin plurfoje, kaj eĉ transkribas ilin se la ricevado estis sufiĉe klara, tio kio preskaŭ ĉiam okazas.

Cl.- Juan NARVAEZ donas por ekzemplo de tiu transskribo elsendon de la 7-a de marto. En ĝi nia kolego Arthur BAUR prelegis pri sunenergio kaj pri la ekspozicio pri sunaŭtomobiloj.

A.- Saulcarite NEILANDE en Riga, Latvio, bonorde ricevis nian sendaĵon kun programo.

Cl.- Saluton al Pawel OLSZEWSKI en PLOCK, Pollando.

A.- Al Andreo ORFLOV en Moskvo, Sovetio.

Cl.- Ilse PANASCHELL en Wien, Aŭstrio, pro kor-atako devis ĉesi sian por-radian laboron en Vieno kaj pro tio ekhavas tempon por skribi al ni kaj aŭskulti nin. Resanigajn bondezirojn ni peronde esprimas.

A.- Ni salutas Louis PANNIER en Tour, Francio.

Cl.- Jean PARMENTIER en Dikkelvenne, Belgio.

A.- Paul PARSONS en Thomton Heath, Surrey, Britio.

Cl.- Rolando PELAEZ en Havano, Kubo, havas la respondecon pri dimanĉa 30-minuta esperanto-elsendo ĉe Radio Habana Cuba kaj informiĝas pri kunlaborebloj. Dum la vintro ni provos realigi kelkajn registraĵojn, kiujn ni dissendos al lokaj radioj elsendantaj ankaŭ en

esperanto. La 11-an de septembro Radio Havano, Kubo, festis la unuan datrevenon de la esperanto-elsendoj. Ni gratulas, kaj esperas longan sukceson. Ni profitu diskonigi, ke okaze de la 75-a Universala Kongreso, la Ministerio pri Komunikado de la Kuba Respubliko pere de sia poŝta administracio eldonis poŝtmarkon kun verda neregula stelo, blanka kolombo kiel paco-simbolo kaj babela turo kiel simbolo de monda multlingveco.

A.- Ray PERSON en Didcot, Britio sendis 6 aŭdraportojn kun akompana letero, kiu raportas pri la graveco de nia perradia laboro por la esperanto-komencantoj. Ni citas lin:

Cl.- ...Mi daŭre kaptas viajn valorajn programojn... Mi estas tre dankema pro la klara kaj ne tro rapida parolado de ĉiuj parolistoj (sed ne de ĉiuj el viaj gast-parolantoj), kiu ebligas al ne spertuloj kiel mi, kompreni la program-enhavon.

A.- Ni fakte profesie parolas provante havi modelan prononcon kaj ne tro rapidan parol-ritmon. Neprofesiuloj nefacile ŝanĝas sian parol-manieron, kiam ili devas samtempe pensi al la respondo, kiun ili alportos al niaj demandoj. Tial la intervjuoj havas vivantecon, kiu korespondas al la lingva realaĵo. Ankaŭ por komencantoj estas bone kutimiĝi al la esprim-maniero de diversaj homoj.

Cl.- Saluton al Alfredo PETROV en Cochabamba, Bolivio, kiu skribis:

A.- Hieraŭ, tute hazarde, mi unuafoje aŭdis vian elsendon. Estis en 31-metra frekvenco, mi ne scias precize, ĉar mi uzis nur etan poŝ-ricevilon je la 23-a horo 15 minutoj laŭ la bolivia tempo.

Cl.- Li petis alsendon de programo skribante:

A.- Mi deziras plue aŭskultadi vin.

Cl.- Reinhard PFLÜGER en Mannheim, Germanio listigas siajn ŝatojn. Tio estas al ni utila.

A.- Viajn radioelsendojn mi ĉiam ŝatas aŭskulti, kaj mi bedaŭras ilian mallongecon. Min plej interesas la raportoj pri politikaj temoj, kaj due tiuj pri la Esperanto-movado, pri turistaj kaj sociaj temoj. Post la prelego mi dezirus anoncon ne nur de la venontsemajna temo, sed ankaŭ de la intertempaj. Tio devas esti ankaŭ laŭ via propra intereso, ĉar nun oni ja povus pensi, ke vi sendas nur unufoje semajne. Plaĉas min, ke la programo estas anoncata fine de la antaŭa programo en la angla, sed mi ne kredas, ke multaj homoj estas atingataj per tio. Mi proponas diri tion (krome aŭ anstataŭe) antaŭ la muziko. Entute mi demandas min, kiu aŭskultas muzikon per mallong-ondoj.

Cl.- Manuel Jose PINGUINHA en Caldas da Rainha, Portugalio skribis:

A.- Mi sincere tre dankas al vi, respondeculoj de Esperanto-fako, kaj al karaj Direktoroj de Svisa Radio Internacia pro la fakto, ke vi ebligas aŭdadon de informoj, kiujn mi ne havus alimaniere.

Cl.- F. W. POPPECK salutis nin el Donaustadt Linz, okaze de la 63-a SAT-kongreso per poŝtkarto montranta la esperanto-monumenton, kiu troviĝas sur la ĉefplaco de tiu aŭstra urbo. Tiun poŝtkarton ni transsendas al la arkivejo CDELI. Tiel ni faras kun ĉiuj dokumentoj, kiuj havas priesperantan signifon.

A.- John PRIMROSE en Harrogate, Britio, per radio-elsendoj intimiĝas kun la lingvo internacia.

Cl.- Raimo PYSTYNEN en Hamina, Finnlando, skribis:

A.- Per 13-metra ondo mi aŭdas vin same bone kiel lokan elsendon.

Cl.- Saluton al Suchanec RADEK en Roznov, Ĉeĥoslovakio.

A.- Al Jean RAVENSCROFT en Cape Town, Sudaŝrika respubliko.

Cl.- Al Koni REY en Litau, Svislando.

A.- Al Volker RIETZ en Jürgenshagen, Germanio ortenta

Cl.- Ludwig RÖLL en Günzburg, Germanio okcidenta sendis al ni 45 aŭskultraportojn tre detalajn. Ili atestas, ke la elsendoj estas ĝenerale bone aŭdeblaj, sen tro da perturboj, kun kelkaj esceptaj tagoj.

A.- Erich SEIDEMANN en Dresden, Germanio orienta, sendis 3 mesaĝojn, inter kiuj poŝtkarto el Japanio, kie li partoprenis en Jokohama la 77-an kongreson de la japanaj esperantistoj fine de aŭgusto.

Cl.- Kimihiro SAKAGAMI en Osaka, Japanio, sendis aŭdraporton.

A.- Saluton al Barbara SMOZENSKA en Rzeszow, Pollando.

Cl.- Nia aŭstra aŭskultanto Kartin STUPPING salutis poŝtkarte okaze de vojaĝoj en Belgio kaj Pollando.

A.- J. STAELS-STERCKX en Bruselo, Belgio, skribis:

Cl.- Mi plimalpli regule aŭskultas viajn elsendojn, precipe lunde kaj sabate. Ekde kiam mi liberiĝis de laboro dank' al maljunaĝo, mi havas pli da tempo por legi kaj lerni nian amindan lingvon internacian. Viaj elsendoj, kiujn mi ordinare facile kaptas, multe helpas min en mia studado. Multan dankon al vi. Mi bedaŭras, ke mi tiel malfrue konatiĝis kun la lingvo internacia kaj la esperantistoj... Mi gratulas vin por la vere tre interesaj prelegoj, kiujn mi provas kiam eble plej surbendigi. Mi eĉ aĉetis specialan radion por aŭskulti la elsendojn en esperanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos sian salutadon al la skribintoj. Ĝis reaŭdo !